

Christian Friedrich Hebbel,

## Vintra pejzaĝo

*tradukita de Manfred Retzlaff*

La blanka faco tute senviviĝis,  
Sin etendante vaste en silent’;  
La gajaj riveretoj rigidiĝis,  
Sin movas eĉ ne la malvarma vent’.

La korvo inter neĝo kaj glacio,  
Profunde sin enfosas tiu ĉi;  
Mi kredas, ke, se ne troveblas io  
Manĝebla, tombon fosas ĝi al si.

La sun’, lastfoje tra nubaro brilanta,  
Rigardas tiun ĉi dezerton nun;  
La mort’, en blanka festvestaĵ’ tronanta,  
Ĝi spitas oscedante al la sun’.

*Traduko de la Germana poemo “Winterlandschaft” de CHRISTIAN FRIEDRICH HEBBEL (\*1813-03-18 – †1863-12-13) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04) en 1997-03-30.*

*MR-305-2 / Arg-785-1572 (2013-01-21 13:29:34)*